

# *La Riverego* kebekia esperantista bulteno

Septembro 2004

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 18, N. 77

## Tio, kion ni faris en 2003-2004

### Normand Fleury

Jaro post jaro, la Esperanto-Societo Kebekia pluekzistas. Eble ne okazis eksterordinara agado pasintjare sed ni tamen plenumis nian ĉefan rolon: informi pri Esperanto kaj la avantaĝoj de tiu lingvo. Mi ĉiam miras konstati kiel la mondo tute ne komprenas la utilon de Esperanto kaj ne vidas la utilon de komuna lingvo. Balbuti la anglan sufiĉas al ili...

Dum la pasinta jaro, la kunsidoj en Montrealo okazis monate (ĉiam la lasta vendredo krom en julio, aŭgusto kaj decembro) ofte kun temo rilatanta al lando. Foje malmultaj homoj ĉeestis kaj mi aŭdis, ke la programo ne ĉiam estis vere interesa. Ne eblas al mi ĉiam ĉion prepari. Estas al ĉiuj pretigi ion por la klubo vespero. Ni ĉiam estas malfermitaj al proponoj kaj novaj ideoj por vigligi la kunvenojn sed gravas, ke ankaŭ vi kontribuu ion al tio. La decembra festo (Zamenhofa) estis tre sukcesa kun granda bufeda manĝo kaj varia vespera programo.

La 2<sup>a</sup> MezKanada Renkontiĝo (MEKARO) plene sukcesis meze de majo kun diversaj interesaj vizitoj al muzeoj kaj tra la metroo. Jam planu ĉeesti la 3<sup>am</sup> en Toronto en majo 2005.

Ni daŭre respondecas pri la organizado de la Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo skiejo, Ludlow, Vermonto. Ni ĉiam ricevas laŭdojn pri ĝi kaj malgraŭ ke la organizado postulas sufiĉe da tempo kaj energio, mi ĝuas ĝian amikecan etoson. Por novuloj tio estas bonega sperto uzi Esperanton. Kiel dirite, ni provos tranlokigi ĝin en Albany, NovJorkio ĉar tiu urbo estas pli facile atingebla ol Ludlow.

Fine, pri informado, mi diru, ke aperis kelkaj mencioj pri Esperanto en *Le Devoir* kaj reagoj al fidiraĵoj. Nia retejo daŭre estas la kerno (por ne diri la koro) de nia informa agado. Danke al ĝi, homoj facile trovas nian societon kaj ofte starigas pliajn demandojn. Ekzemple mi devis respondi al peto pri sugesto de nomo por estonta bebo aŭ pri tradukado de poemo aŭ kanto kaj eĉ oni petis de ni, traduki la geedziĝan frazon 'oui, je le veux' !

## Belaj momentoj en Rusio

### Normand Fleury

**Hejmas mi en Montrealo post monato en Rusio. Kia trankvilo post monato da aktiva vivo en Rusa Esperantio. Mi legas libron pri feliĉo en la vivo kaj tio multe pensigas min. Kio pli gravas, materiaj posedaĵoj aŭ amikaro? Mi min demandas kial mi ŝatas vojaĝi? Kial mi ŝatas Esperanton? Kial mi sentas min aparte feliĉa inter Esperantistoj? Kial mi elspezas sufiĉe multe da mono por konatiĝi kun homoj el diversaj landoj sciante ke eble mi neniam revidos ilin?**

Eble ĉar mi sentas ke mi partoprenas en io unika. La ekstera mondo ne komprenas nin, kion ni sentas kiam

ni kunas. Mi certe povus pagi al mi hotelon kaj komforton dum miaj ferioj kaj iri al turistaj lokoj sed anstataŭ kial mi tiom ĝuas konatiĝi, amikiĝi kun homoj el la tuta mondo. Multaj homoj kolektas ion ĉu mia kolekto konsistas el amikoj de la tuta mondo !

Dankon al vi karegaj Rusoj, por tiom belaj momentoj da amikeco, da bonkoreco kaj da homeco. Vi povas fieri pri MAK, la 60a IJK kaj PK en Ĉebo. Mi jam forgesis kiam oni konstruis la katedralon apud Kremlo aŭ kiom altas la statuo de ĉuvaŝa patrino en Ĉebosari sed neniam forgesos ke vi traktis min dum mia restado en Rusio kiel proksima amiko eĉ kiel frato.

# Ĉu *La Riverego* fariĝu reta bulteno, por tiuj, kiuj volas ĝin tiel?

Estimataj membroj,

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia nun pristudas la eblecon igi *La Riverego* komputilreta bulteno. Ĉar vi estas la unue koncernataj, ni ŝatus ricevi de vi iajn informojn.

1. Ĉu vi deziras ricevi *La Riverego* komputilrete prefere ol paperpoŝte? Aŭ ĉu vi preferas paperan bultenon plus fojaj retroŝtaj lastminutaj informoj? Kial?

2. Ĉu via retroŝta programo povas utiligi Unikodajn literojn? (Uzataj por la afiŝado de la esperantaj supersignoj.) Malsimplan paĝaranĝon, kun diversstilaj literoj kaj bildoj?

3. Ĉu vi kapablas ricevi PDF-dosierojn (legeblajn per *Acrobat Reader* aŭ simila programo)?

Dankon pro viaj respondoj.

Sylvain Auclair

Chers membres,

Le Conseil d'administration de la Société québécoise d'espéranto étudie actuellement la possibilité de transformer *La Riverego* en un bulletin électronique. Comme vous êtes les premiers concernés, nous aimerions obtenir de votre part certaines informations.

1. Désirez-vous obtenir *La Riverego* sous forme électronique plutôt que sur papier? Ou préférez-vous un bulletin papier avec, occasionnellement, des nouvelles de dernière minute par courriel? Pourquoi?

2. Votre gestionnaire de courriel est-il capable d'afficher les caractères Unicode (utilisés pour les lettres accentuées de l'espéranto)? Une mise en page complexe, avec différents style de caractères et des images?

3. Êtes-vous capable de recevoir un fichier PDF (avec *Acrobat Reader* ou un programme similaire)?

Merci de vos réponses.

Répondre à: [esperanto@sympatico.ca](mailto:esperanto@sympatico.ca)

## Quelques erreurs fréquentes

**Sylvain Auclair**

Alors que je participe aux quelques réunions espérantistes qui se tiennent à Montréal, je note souvent des erreurs dans le discours de mes interlocuteurs. Des erreurs récurrentes. Et je ne parle pas ici de l'oubli de l'accusatif. Je me permets donc de ressusciter une vieille rubrique linguistique, peut-être pour une seule fois.

### Estas eble fari

Tout d'abord, l'attribut avec un infinitif. Habituellement, après le verbe *esti*, on utilise un adjectif: *La ago estas ebla. La virinoj estas belaj*. Cependant, il est impossible d'accorder un adjectif avec un verbe à l'infinitif. On ne peut pas dire: *agi estas neceso*; on doit dire: *agi estas necese*. De même, on doit dire: *Estas necese, ke ni faros tion tuj*.

### Post kiam et antaŭ ol

Très souvent, par imitation du français, on entend *antaŭ ol mi faru*, avant que je fasse. On entend

aussi, par imitation d'une erreur fréquente en français: *post kiam mi faru*: après que j'ai fait, après que je ferai. On entend aussi, ce qui m'écourche l'oreille: *antaŭ ke* et *post ke*, sans doute par analogie avec *avant que* et *après que*.

Tout à fait logiquement, l'espéranto utilise l'indicatif (-as, -is et -os) après ces conjonctions: *antaŭ ol mi faris, antaŭ ol mi faros, post kiam mi faris, post kiam mi faros*: avant que je fasse, après que j'ai eu fait, après que je ferai. Tout simplement. Plus simplement qu'en français, d'ailleurs.

# Plia sukcesa jaro, *retflanke*

## Jessy LaPointe

La jaro 2003-2004 estis denove tre sukcesa periodo, por nia reta paĝaro. Eĉ se ni ne sukcesas allogi novajn membrojn por ESK, ni tamen daŭre varbas kaj instruas Esperanton.

De pli ol kvar jaroj, proksimume tri ĝis kvin novaj lernantoj faras la deklecionan metodon kiun ni proponas sur la reto. Pli-malpli 80% el tiuj lernantoj estas Kebekianoj, la aliaj estas ĉefe Eŭropanoj kaj Afrikanoj.

Du aspektoj iom malhelpis krei pozitivajn efektojn.

Unue, ESK volis preni tempon pretigi belegan novan informfaldfolion. Tion ni faris, sed intertempe, ne eblis sendi aliĝilojn kun la diplomojn. Tial, multe da lernantoj ne estis vere invitataj aliĝi. Tio ŝanĝos post kelkaj semajnoj.

Due, la firmao Sympatico kaŭzis al ni problemojn. Ili simple nuligis ilian servon per kiu oni povis uzi komputilajn formularojn por ebligi la respondadon al ekzercoj aŭ aliĝiloj

al ESK aŭ Okemo. Tiel, la organizado de pluraj el niaj aktivadoj estis malfaciligita. Tial, finfine, ni abonis al CAM Montréal por lui novan retan spacon. Feliĉe, CAM ofertas al ni duoblan spacon, kiun ni certe uzos por enmeti eĉ plu da enhavo en nian retpaĝaron.

Parolante pri enhavo: se vi iras al la fino de la Esperanta Unikoda versio de la "Kontatku nin"-sekcio, vi malkovros, ke ni publikigis la protokolojn de ESK de la fundado ĝis nun, kaj nian statuton...

## La viro, kiu strebis trinki kurante

### Francisko Lorrain

Jen vera rakonto. Antaŭ deko da jaroj, mi gvidis vesperan klason de matematiko por plenkreskuloj. Unu fojon, mi estis doninta eble iom tro longan periodon da tempo por ekzercoj, je la fino de la vespero. Krom kelkaj persistemuloj, ĉiuj estis jam foririntaj.

Tiam iu studentino, kiu havis tipan Latin-Amerikan aspekton kaj akĉenton, elironte, salutis min. Ni komencis babilu kaj mi demandis ŝin, el kiu lando ŝi estas, kaj tiel plu. Ŝi estis el Gvatemalo. Ŝi devis fuĝi la landon kun sia edzo kaj infanoj.

Li havis planto- kaj florvendejon. Kompreneble, li ofte vizitis diversajn fambienojn en la kamparo por aĉeti plantojn por la vendejo. En tiu tempo viglis la tiel nomataj "mortskadroj": ekstrem-dekstrulaj grupoj, kiuj, kaŝe kaj nepunite, persekutis ĉion maldekstrulecan. Envenis en la

kapo de iu tia grupo, ke tiu florvendisto estis ja suspektinda, ĉar li daŭre rilatis kun kamparanoj — ĉiuj suspektindaj homoj, ĉar kampare kaŝis sin gerilanoj kaj ĉiuspecaj opoziciuloj. Tiu mort-skadro unu tagon kaptis lin, kaj enŝlosis lin kune kun kelkaj aliaj suspektatoj en ĉambro de iu kazerno.

Tiu ĉambro ne estis ordinara ĉelo. Ĝi estis simpla stapla ĉambro. La enhavo de la ĉambro estis metita en la koridoron, la malliberuloj enirigitaj, la pordo fermita, kaj fine la staplaĵoj stakigitaj (laŭ tio, kion ili povis aŭdi) kontraŭ la pordo en la koridoro. Kial tia stakado? Ĉar mortskadroj devis kaŝi sian agadon, por ke oni ne sciu, ke ili estas apogataj de la registaro.

Dum longaj horoj, la kaptitoj kaŭris en sia ĉambro. Sen manĝi, nek trinki. Sen necesejo... Ili aŭdis normalajn bruojn en la koridoro. Kelkfoje ili provis kriegi por atenti la preterpasantojn malantaŭ la pordo. Nenio.

Post du tagoj ili malsategis, ili soifegis, ili... ne kapablis plu elteni. Fuĝi tra la alta fenestreto ne eblis, eĉ por la plej maldika el ili. Iu el la kaptitoj ekprenis ŝtonon, kiu kuŝis tie, kaj komencis frapi per ĝi la eksteran muron. Alia ankaŭ trovis ŝtonon kaj frapis. Neniu ene de la kazerno atentis ilin. La muro estis nur ordinara malaltkvalita muro. Baldaŭ ili sukcesis fari truon sufiĉe grandan por eliri.

Sed tiam ekpluvis. Unu el tiuj tropikaj pluvegoj, kiuj donas la impreson ricevadi sur la kapon plenajn sitelegojn da akvo.

— Ĉu ni atendu la finon de la pluvo?

— Male! Jen la tempo eskapi, kiam ĉiuj gardistoj ŝirmas sin en la kazerno!

Unu post la alia, ili ĵetis sin eksteren, kaj kuregis, kuregis por savi sian vivon. Sed la soifo tiom turmentis la flor-vendiston, ke, dum li kuris per siaj tutaj fortoj, li samtempe klinis la kapon malantaŭen kaj trinkadis, trinkadis, rekte el la ĉielo.

# Raporto pri la financoj

**Sylvain Auclair**

**L'année financière a montré une légère perte. Le point principal a été la sous-estimation du coût de l'abonnement au *Monde de l'espéranto*, pour lequel le conseil d'administration a dû fixer une nouvelle cotisation.**

Surpizige, la financa jaro (de junio ĝis majo) finiĝis per malgranda perdo je 71 \$. Surpizige, ĉar ni devis, pro malfruoj flanke de la Unuiĝo franca per Esperanto, sepfoje aĉeti kaj sendi la revuon *Le Monde l'espéranto*. Sumaj kotizoj (inkluzive de la abonoj al *Le Monde de l'espéranto*) malkreskis de 1550 \$ al 1220 \$, pro malkresko de la membraro; donacoj kreskis de 150 \$ al 340 \$, sed ni ĉesis aboni telefonon meze de la jaro, kio igis nin ŝpari 120 \$. (Tamen, por la nuna jaro, ni devos pagi por gastigo de la tt-paĝaro...) Por informado, ni daŭre elspezas malpli ol 100 \$, kio montras pli mankon de aktiveco ol bonan mastrumadon.

La plej elstara punkto estis la pruvo, ke ni forte subtaksis la koston abonigi niajn membrojn al la franca revuo. Kvankam por sep numeroj, kaj kvankam la abonantnumero malkreskas, niaj kostoj altis ĉirkaŭ 1400 \$ dum la abonoj sumis nur 650\$. Sekve, la estraro estis devigata altigi la kotizon al 48 \$, anstataŭ 32 \$.

Kompletan raporton vi povos trovi ĉe nia retpaĝaro: [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca).

## Por aboni al UEA...

La kotizotabelo (kun la difino de la diversaj kategorioj) de UEA por 2005 estas trovebla ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org). Vi ankaŭ trovos la nomon kaj adreson de la Kanada peranto, kaj enkonduketon por inviti aliĝi. Vi nur devas kopii...

Pri la membraro, la malkresko pluas. Nia societo nur nombras malpli ol 70 membroj, kies liston vi cetere povas peti de mi. Eble kulpas la Interreto, kio ebligas Esperantumi sen la bezono membri en asocio; eble ankaŭ kulpas la malagademo de la estraranoj kaj de ĉiuj membroj rilate reklamadon pri Esperanto kaj pri nia societo. Ni vidu...

## Venontaj aktivajoj de la Montreala Klubo

Vendredo, la 29<sup>am</sup> de oktobro 2004, je la 19:30

Vendredo, la 26<sup>am</sup> de novembro 2004, je la 19:30

## Prochaines activités du Montreala Klubo

Vendredi 29 octobre 2004, 19h30  
Vendredi 26 novembre 2004, 19h30

6358A, rue De Bordeaux  
Montréal

*La Riverego (Le Fleuve)* est publié par la Société québécoise d'espéranto, en janvier, mai, septembre et novembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. *La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en januaro, majo, septembro kaj novembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90-oble. Senpage por la membroj de la ESK.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2004.11.15**

[jessylapointe@hotmail.com](mailto:jessylapointe@hotmail.com)

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prézidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier/kasisto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj Martin Benoit (administrateur/konsilanto).

**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**  
6358-A, rue de Bordeaux  
Montréal (Québec) H2G 2R8

[esperanto@sympatico.ca](mailto:esperanto@sympatico.ca)  
[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)